

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

AÑO XX - Nº 249-250

ENERO-ABRIL 1982

MALAGA KONGRESURBO POR 1982



Tajo de Ronda (Málaga)

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

DIRECTORA:

D^a M^a Aurora Vitoria Nieto

DIRECCION

Y ADMINISTRACION:

Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

REDACTOR JEFE:

D. Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 3338081
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION:

D. Giordano Moyá
D. V. Hernández Llusera
D. Gabriel Mora y Arana
D. Pedro Nuez

UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Prezidantino

M^a Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12 2^o-C
Télf. (983) 260086
VALLADOLID

Sekretario

Luis Hernández García
adreso kiel supre

Kasistino

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde 8-8^o-A
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto
N^o 001.664-0

Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana E.
A. Lorenzo Hurtado, 1
VALLADOLID

LIBRO-SERVO DE H.E.F.

Jacinto Urueña Antón
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Pagoj por Libro-servo, sendu al
Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cuenta N^o 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE H.E.F.
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
P^o de la Constitución, 35 4^o
ZARAGOZA-1

INFORMA FAKO

Ramón Molera
Sta. Joaquina, 13
MOYA (Barcelona)

ĈEFDELEGITO DE UFA

Juan Azcuénaga Vierna
Capitán Palacios, 3 4^o N
SANTANDER

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinionon de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinionon de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

MALAGA KAJ LA PROVINCO



Ĝenerala vidaĵo de la haveno

Kiel vi jam scias, la venontan someron, okazos en ĉi tiu andaluzia urbo la 42-a Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio. Ĉeesti ĉi tiun eventon estos ŝanco por studi la problemojn de la Movado kaj, samtempe, ĝui per la rigardo de tre multaj vidindaĵoj de Malaga kaj de ĝia provinco.

Fondite de la kartaganoj en la 5-a jarcento antaŭ Kristo, ĝi estis okupata, sinsekve, de romanoj, visigotoj, grekoj kaj muzulmanoj, kaj estis parto de la Granada-regno ĝis 1487-a rekonkerite de la Katolikaj Reĝoj en tiu jaro. Dum la 16-a jarcento Málaga estis tre grava lana haveno en Mediteraneo. Post krizo de sia komerco, la urbo releviĝis, denove, dum la sekvintaj jarcentoj kiel komerca kaj demografia centro de la provinco. Nuntempe, Málaga enhavas loĝantaron de pli ol 500.000 personoj.

Ĝi estas bela kaj gaja, sia klimato estas milda kaj altiras, senĉese, grandegan kvanton da turistoj en-kaj eksterlandanaj. Singer, en sia klasifiko pri la homa alĝustigo en malsamaj lokoj de la Planedo, diras ke la Suna Marbordo (kies ĉefurbo estas Málaga) prezentas la plej grandan komforton klimatan dum la monatoj junio, julio, aŭgusto kaj septembro. La meznombro da ŝtormaj tagoj estas nure unu kaj, tiu de nebulaj, kvar, ĉiujare. La pluvaj tagoj estas malabundaj.

Ĉi tiu mediteranea urbo havas bonegan havenon, nacian kaj internacian aerodromon, fervojojn kaj abundajn atingejojn landvoje.

El tutaĵo monumenta de Málaga estas elstarindaj:

La «Alcazaba», antikva palaco de la arabaj reĝoj de Malaga.

La «Arkeologia Muzeo» enhavanta ĉambregon de romana kaj hispanaraba prahistorio.

La «Katedralo» renesancstila konstruita en la jarcentoj 16-a kaj 17-a.

La «Tabernakla Preĝejo» prezentanta gotikelisabetan frontispicon kaj 16-an bildaron.

La «Jakva Preĝejo» havanta memorindan turon.

La «Romana Teatro».

La «Episkopa Palaco» prezentanta barokan fasadon.

La «Konsuldomo», tipa specimeno de antikva palaco.

La «Muzeo de Belartoj» enhavanta verkojn de El Greco, Zurbarán kaj Ribera, kaj ĉambregojn de modernaj kaj samtempaj pentraĵoj.

La «Muzeo de Popolaj Artoj».

La «Muzeo de Sankta Semajno» de la Kunfrateco de Tre Sankta Kristo de la Elspiro.

La abundaj ĉambregoj de ekspozicioj konsistigas Málaga-n kiel

urbo de la pentristoj. Ĝi posedas belegan **Komunuman Parkon kaj Ĝardenoj-n** de Malluma Pordo de grandega vario multa. Ankaŭ estas vidindaj la kampobienoj «El Retirò» kaj «La Concepción» kun botanika ĝardeno.

Elegantaj kvartaloj de «La Caleta» kaj «Miramar», **strandoj** de la banejo «El Carmen», «El Palo», «Acacias», «Pedregalejo» kaj «El Chanquete», kun maldika sablo, kaj tiu de «Sankta Andreo» **sus kilometrojn** longa, Sporta Haveno kun tutaj servoj kaj Golfkampo «El Candado» kun naŭ kavaĵoj ebligas tre agrablan restadon en Málaga.

Ĉi tiuj estas iuj el nombraj allogaĵoj kiujn havas la urbo kie okazos la proksima kongreso.

La Costa del Sol ĉiam ŝatas la turistojn pro tio, ke ĝia klimato estas milda kaj ĝiaj strandoj bonegaj kaj abundaj. Torremolinos, Fuengirola, Marbella, Torre del Mar, Rincón de la Victoria, Benalmádena, ktp. estas lokoj memorindaj pro iliaj plaĝoj, hoteloj k. festejoj.

Sed Málaga estas io plua. Interne de ĝi troviĝas urboj kaj vilaĝoj konsiderindaj, ekzemple, Nerja, Antequera, Ronda, Alora... Mi rakontos, sekve, iom pli la plej gravaj.

Nerja estas belega natura scenejo kie elstaras la belvidejo «**Balkono de Eŭropo**». En la cirkaŭejoj de ĉi tiu urbeto troviĝas tre bela prahistoria kaverno kun stalaktitoj k stalagmitoj, plaĝoj kiaj Burriana, Caveo, Calahonda, ktp.

Antequera nombras 41.600 loĝantojn kaj estas urbo de romana origino. Ĝi enhavas restaĵojn de arabaj remparoj, Arkon de Sankta María (apartenanta al 16-a jarcento) Kaj Preĝejon de Sankta María. Estas tre valora la «Muzeo de Antequera» kiu situas ene de Najera Palaco. Ĉe la apudejoj de la urbo troviĝas prahistoriaj dolmenoj de Menga, Viera k. Romeral. Je 13 kmj de la urbo ni povas ĝui per la rigardado de «El Torcal», ejo de surprizanta natura beleco **meze** de interkruteja pejzaĝo.

Sur altebenaĵo situas Ronda, kiu estas natura fortikaĵo kies muroj oni rompas por fari la fendon «Tajo de Ronda». Ĉi tiu urbo nombras proksimume 32.000 loĝantojn kaj estas unu el la plej antikvaj de Hispanio. Inter aliaj altiraĵoj ĝi entenas Restaĵojn de antikvaj remparoj kaj de arabaj stratoj, gotikan kaj renesancan Kolegian Preĝejon de Sankta María la Plej Granda (antaŭe araba preĝejo), palacon kun belaj frontispicoj, la Novan Ponton (18-a jc.) kaj Arkon de Filipo V-a.

Alora, unu el la plej riĉaj kaj pitorescaj vilaĝoj de la provinco, estas ŝatata, oficiale, historia kaj arta tutaĵo.

Arroyo de la Miel enhavas Amuzejon «Tivoli» kiu funkcias ĉiutage dum la somera sezono, kaj Mijas estas tipa vilaĝo blanka kaj metiista kie troviĝas du golfkampoj.

Fine, estas rimarkindaj ĉe Casares la Banejoj de la «**haladzantino**» kies sulfuraj akvoj estas tre efikaj por la haŭto, ĉe Carratraca alia por kuraci reumatismajn malsanulojn kaj ĉe Tolox tria kontraŭa al spirduktaj malsanoj.

Gesamideanoj, Málaga vin atendas. Estu **bonvenaj al la Kongreso!**

ANDRES MARTIN
(Prezidanto de L. K. K.)

Sankta Tereza de Jesuo, Doktorino de la Eklezio

(Okaze de la IV-a jarcentdatreveno de la glora forpaso 1582-a-1982-a)

Vox populi, vox Dei: popola ankaŭ Dia voĉo. La popolo ne nur en Hispanujo, sed en la tuta mondo, ĉiam nomis S. Tereza-n Mistika, serafa Doktorino. Tiel ŝi ja estis nomata ekde la plej malnova tempo, de la naŭva popolo ĝis la eminentuloj en ĉiu tereno. Lia Reĝa Moŝto Alfonso la XIII-a ŝin premiis per la doktora bireto la jaron 1922-an, kion pasie aplaŭdis la hispana popolo. La sama monarko donacis al ŝi oran fontoplumon, kaj, doninte ĝin —ekster la protokolo— la Reĝo, akompanate de tondra popola aplaŭdado de ĉeestantoj, emocie kisis la bildon de la Sanktulino.

Spiritualium Mater (jen devizo de sia vatikana statuo): **de la spirituloj, Patrino Doktorino** —antaŭ ĉio— de la preĝo, de la vivpreĝo, kiel propra specialaĵo. «La preĝo, la vivpreĝo (ŝi skribis) estas la plej granda bono de la surtera vivo» (Vivo, 7, 10).

a) **Preĝo, dialogo kun Dio.** Unue, kio estas preĝo laŭ S-ta Tereza 1) Pripensi kaj scii kion ni diras kaj kun Kiu ni parolas, kaj kiaj ni estas kiuj kuraĝas paroli kun tiel granda Sinjoro» (Vivo, 25, 3). 2) Preĝo ne estas alia afero (ŝajnas al mi) ol amike kun Dio rilati, multfoje traktante solece kun Kiu ni scias ke Li nin amas (Vivo, 8, 5).

b) **Preĝo, vojo al la ĉielo.** Animo kiu fidela plenumas preĝan vivon, ne eraros nek devios. Sed... «animoj kiuj ne havas preĝvicon, similas al kripla, paraliza korpo (Restadejoj I, 1,6). «Devoji-



ĝi ne estas io alia ol lasi la preĝvicon (Vivo, 19, 12) Do... «neniam lasu la preĝon» (Vivo 11, 10). «En malĝoja okazaĵo, ne lasu la vivpreĝon (Av. 66) ĉar «ĉion povas preĝo» (Letero 2,2) kaj «ĉiam estas necesa multa preĝo» (Letero 107, 2).

Rilate al la daŭro, ĉu sufiĉas nur unu horkvarono ĉiutage?: «Donu al mi animon kiu unu horkvaronon ĉiutage preĝados, kaj mi donacos al ĝi la ĉielon». Tamen ne estas tiu ĉi aserto de nia Doktorino, almenaŭ laŭvorte kyankam la ideoj ja estas similaj. «Ĉar mi ne prenis horojn de soleco por preĝi, la Sinjoro mem koncentriĝis min eĉ en mia parolo (Vivo, 25, 16) «Grandan bonon faras Dio al la animo kiun Li

disponigas por preĝo... se tiu plu preĝas. Eĉ se pekojn, tentojn kaj falojn altrudos la diablo..., mi estas certa ke la Sinjoro eltiros tiun animon al sava haveno» (Vivo 8, 4).

«Estas grandega profito komenci vivpreĝon, sin liberigante de ĉia plezuro» (Vivo, 15, 11). «Soldatoj de Kristo estas tiuj kiuj havas preĝan vivon» (Vojo 38, 2).

c) **Preĝo, vojo per etapoj**
«La enirpordo al ĉi tiu kastelo estas la preĝo» (Restad. Prol. 1). Jes.: «estas la preĝo kaj medito; mi ne diros ke estos pli mensa ol voĉa, ĉar (se estas vera preĝo) devas esti ja medito» (Restad. I, 7) Jen kelkaj alegoriaj similaĵoj kiujn uzas Tereza: animo estas kiel ĝardeno; virtoj, floroj; preĝo estas irigacio... Oni parolas pri baseno, norio, pluvdefluiloj por irigacio; pri ĉiela pluvo kaj kvar gradoj de la progresema preĝado. Kaj en ĉi tiu laborado Kristo-Viro (pere de Lia Sanktega Humanigo) sin oferdonas kiel amiko, kunestanto, preskaŭ kamarado, Kontraŭ malsimilaj opinioj de tiu danĝera, inkvizicia epoko.


Agoj, agoj, el la preĝvivo fruktoj. «Ĉiutage mi komprenas pli la fruktojn de la preĝo» (Letero 147), 5). «Por ĉi tio taŭgas preĝo, miaj filinoj (ŝi parolas al siaj monahinoj): por tio utilas la spirita geedziĝo, de kie devenas kaj sprucas ĉiam agoj, agoj!!! (restad. VII, 4, 6) «Preĝo, preĝo, miaj filinoj» (Letero 164, 2 k. 1174, 8). Do la agoj ekfluos el preĝvivo kiel pura akvo el malavara, pura fonto.

Amo al la Eklezio. Estas ĉi tiu la unua frukto kiu devas versiĝi el la preĝo. «ĉar mi vidas la bezonojn de l'Eklezio..., kiuj min suferigas tiel kaj tiom, ke ŝajnas al mi moko ĉagreniĝi kaj malĝoĝi

pro iu ajn alia knŭzo» (Relac 3-a 7) **Badamunde** hodiaŭ ni ĉiuj ĉagrenigas, malĝojas pro la Eklezio, pro ĝinaj krizoj kaj malfacilaĵoj. Estas tiel facile kulpigi la Konkilion, kaj samtempe ĉie kaj ĉiam kritiki ĉion kaj ne obei la Konkilion, nek la Papon, nek niajn Episkopojn... Babili, babili, eĉ babiladi... «Preĝo, preĝo; agoj, agoj» —ni diros kun nia Sanktulino— preĝo kaj agoj, ne nur vortoj, eble tre belaj, sed... Ĉar Tereza suferis tiom multe pro la Eklezio, ŝi ĝojegis forpante en la sino de la sama Katolika Eklezio. Jen ŝia testamento: ŝiaj lastaj vortoj: «Finfine, mi estas filino de la Eklezio», kaj estante tial forpasas.

Doktorino de la vero.—La vero suferas, sed neniel pereas (Restad. VI, 10, 7). Kiel Sankta Aŭgusteno, ŝi ĉiam amis pasie la veron; ĉiam kaj ĉie ŝi diris la veron; kaj malamis tutkore la mensogon. Ŝi preskaŭ forpelis el la religia komunumo iun monahinon, ĉar estis dubo ĉu tiu-ĉi diris ne malveron, sed nur malĝustaĵon. «Dio mem estas grandega vero... La humileco estas la vero» (Restad VI, 10, 7).

Doktorino kaj Majstrino de la Eklezio. a) Majstrino de teologoj. Inter aliaj de Dominiko Banjez (Bañez), Petro Ibanjez, García de Toledo, «tre bona por esti nia amiko»; Pastro Hieronimo Gracián, Cetina, Baltazaro Alvarez, Ripalda, Prádanos kaj la laikulo Francisko Salcedo «la sankta kavaliro». b) **Majstrino de Majstroj.** Johano de Avila, Deza, Bartolomeo de Medina, «malamiko de virinaj virtoj». Poste tamen li ŝanĝis sian opinion kaj tute nuligis ĝin parolante kun ŝi, rilatante kaj aŭdante ŝin. En tiu malprok-



Alba de Tormes

sima epoko, enĉenigita de spaco, tempo kaj multaj antaŭjuĝoj, pravis Pastro kaj Majstro tiel saĝa kaj plenplena je skolastika teologio, kiel Bartolomeo de Medina, kiam li diris satire el sia katedro de Salamanko, aludinte precize Sanktan Terezan, ke «estas virina tasko iradi kaj reiradi de vilaĝo al vilaĝo, kaj pli bone estus se tiaj virinoj hejme restus, preĝante kaj ŝpinante». c) **Majstrino de Episkopoj**. La ĉarmo elirinta el nia Sanktulino, ĉiun personon ce ŝi vivantan nepre altiradis, vekante intereson pri ŝi. Nome: Nuncio Segar, kiu antaŭe tamen diris pri ŝi parolante furioze: «Virinaĉo malkvieta kaj vagema»; Alvaro de Mendoza, Velazquez, Jepes, Manso, kiu iam asertis: «Pli bone mi volus argumenti kun teologoj de l'tuta mondo, ol diskuti kun tiu virino» k. t. p. d) **Majstrino de Doktoroj de l'EKLEZIO** Sankta Johano de la Kruco, kiu kunlaboris reorganizante la karmelan ordenon; S-ta

Francisco de Sales, S-ta Alfonso Maria de Liguori. e) **Majstrino aktuala**. Kies mirindaj verkoj estas tre aktualaj, skuantaj la animojn.

Pli ol cent eldonoj de ŝia tuta verkaro, de la jaro 1588-a ĝis nun, nur en hispana lingvo, kaj multnombraj tradukoj al precipaj lingvoj de la mondo, jen parte, jen tute. Tute: Francaj eldonoj, 50; italaj, 47; germanaj, 20; portugaliaj, 16; polaj kaj nederlandaj, 10; anglaj, 9; latinaj, 2. Parte (Krom en la antaŭaj lingvoj): araba eldono; kroata, ĉina, dana, malaja, tamila, rusa, japana, finna, k. t. p.

Ni, do, sekvu tiun mirindan doktrinon de la Doktorino kaj Majstrino de la Eklezio kaj tio estas la plej bona sukceso de la IV-a jarcento, kiun ni festas ĝojege. Tiel estu!!!

**Pastro de Fuentes kaj de Valbuena
(Karmela Ordeno)**

Semajno de Senarmigo en la Unuiĝintaj Nacioj

La semajnon de la 24-a ĝis la 30-a de Oktobro 1981-a, Unuiĝintaj Nacioj deklaris «Semajnon de la senarmigo». Dum tiu semajno multaj manifestacioj favore al senarmigo okazis en la sidejo mem de U.N. kaj ankaŭ en multaj aliaj lokoj de Novjorko kaj aliaj urboj de la mondo. Ankaŭ la Novjorka oficejo de UEA okazigis bone vizititan kunvenon en kiu oni diskutis la eblan kontribuon de la esperantistaro al la senarmigo. Tiu ĉi artikolo, diskoniganta la ideojn de senarmigo, estas plua formo de nia kunlaboro kun la laŭdindaj klopodoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Inter la okazaĵoj en la Novjorka sidejo de U.N. eble la plej rimarkinda evento estis parolado de Olof Palme, eksĉefministro de Svedujo kaj ĉefo de sendependa Internacia Komisiono por Senarmigo, al ni bone konata pro sia favora sinteno al Esperanto.

Antaŭ ĉio S-ro Palme atentigis ke la postmilita timo de la atombomboj iom post iom malaperis, kaj la nuna homo konsideras la atoman armigon kaj eventualan atoman militon kiel ion neeviteblan.

Jam en la nuna stadio en nur kelkaj minutoj iu ajn el la superpotencoj kapablas superŝuti la alian per atombomboj. Fine, la popoloj komencis reagi, ĉar ili konsciiĝis ke la eventuala atommilito, limigita aŭ ne, atingos ne nur tiujn kiuj ĝin iniciatis, sed ĉiujn, ankaŭ neutralajn kaj nealiancitajn landojn. Li menciis la studojn de D-ro Chazof kaj de D-ro Hiatt pri la efikoj de eksplodoj de 20 megatuna atombombo super Bostono. Ĝi postlasus 2.240.000 mortintojn, eĉ pli multe da vunditoj, blindaj, malsanaj kiuj kuŝus senhelpaj ĉar la kuracistaro samproportie pereus kaj estus vundita. La akvo kaj nutraĵoj estus venenigitaj kaj la ĝenerala situacio estus katastrofa, senespera. La armilkonkuro malebligas la ĝeneralan evoluon. Krome, la rezervoj necesaj por la evoluo estas antaŭ ĉio la alte kvalifikita laborforto, kapitalo kaj naturaj riĉaĵoj, nun uzataj por krei pli kaj pli efikajn armilojn.

Ĉiuj nacioj havas rajton al arma defendo. Sed tridek kvin jaroj de armiga konkuro ankaŭ pruvis ke arma forto sola ne sufiĉas kiel bazo por sekureco. Sekureco devas esti konsiderata el pli vasta perspektivo ol nur arma. Por individuoj, por nacioj kaj por la homaro, sekureco havas ankaŭ ekonomian, socialan kaj kulturalan aspekton.

«Grava aspekto de nia laboro estas esti en kontakto kun Neregistaraj Organizoj. La N.R.O-j estas inter la plej bonaj vojoj por atingi publikan opinionon, por interesigi la homojn pri tiuj esencaj temoj pri nia estonteco. Kaj tio estas necesa pro pluraj kialoj. Ekvilibrita senarmigo povas esti atingita nur tra intertraktado. Kaj por ke tiuj intertraktadoj estu sukcesaj, por igi la rezultojn akcepteblaj kaj akceptataj, la popolo devas ilin partopreni.

Albert Einstein iam avertis kio okazus se la popolo ne partoprenus, se la popolo ne reaguos:

«La politika apatio de la homoj en paca tempo indikas ke ili volonte lasos sin gvidi al la buĝejo poste. Ĉar hodiaŭ ili ne havas eĉ la kuraĝon doni sian subskribon por senarmigo, ili estos devigataj verŝi sian sangon morgaŭ».

Tiu ĉi estis intenca provoko flanke de tiu grandulo. Nun, fruntante la faktojn, mi estas konvinkita ke la popolo reagos, ke la homoj postulos la haltigon de la armilkonkuro kiel sian rajton. Jam en 1959 a. la Prezidento Eisenhower asertis: «Mi volas kredi ke homoj en la estonto faros pli multe por antaŭenigi la pacon ol niaj registaroj». Vere, mi opinias ke la homoj volas la pacon tiel forte, ke plej bone estas ke la registaroj cedu al ili kaj havigu ĝin al ili.

Tio estas defio kaj kuraĝigo al la Neregistaraj Organizoj.

(Skizo de artikolo sendita de la Novjorka Oficejo de U. E. A.)

LA ORIGINO DE LA MORTO

(Afrikaj Popolrakontoj)

(Premio «Sancho Rebullida» en la Internacia Literatura Konkurso, organizita de «FUNDACION ESPERANTO» en 1980-a)

Iam estis maljuna virino, kiu apartenis al familio kun longa genealogio. Kontraŭ ŝia familio etendis sian manon Leza Ŝikakunamo, «La Persekutulo». Li mortigis ŝian patron kaj patron dum ŝi ankoraŭ estis infano, kaj en la daŭro de la jaroj ĉiuj ligitaj kun ŝi pereis. Ŝi diris al si, «Certe mi retenos tiujn, kiuj sidas sur miaj genuoj». Sed ne; eĉ ili, la infanoj de ŝiaj infanoj, estis forprenitaj de ŝi.

La oldulino velkis pro maljuniĝo, kaj ŝajnis al ŝi, ke finfine ŝi mem estas forprenota. Sed ne; ŝanĝiĝo okazis al ŝi. Ŝi fariĝis pli juna. Tiam venis en ŝian koron intensa decido trovi Dion kaj demandi pri la signifo de ĉio ĉi. «Ie, supre en la ĉielo», ŝi pensis, «devas esti lia loĝejo; se mi nur povus ĝin atingi!».

La virino komencis dehaki arbojn, enormajn, altajn arbojn, kunligante ilin kaj tiel planante konstruaĵon, kiu atingos la ĉielon. Ĝi kreskis kaj kreskis, sed ĝuste kiam ĝi komencis akiri la formon, kiun ŝi deziris, la plej malaltaj traboj putris, kaj la turo falis. Ŝi falis kun ĝi, sed nek mortis nek rompis oston. Denove ŝi dediĉis sin al la laboro kaj rekonstruis la turon, sed ankoraŭfoje la fundamento putris, kaj la konstruaĵo falis.

Senespere ŝi rezignis la konstruaĵon, sed ne sian intencon trovi Leza, dirante, «Ie sur la Tero devas esti alia vojo al la ĉielo!».

La serĉanto al Dio komencis vojaĝi, pasante tra unu lando post alia, vizitante unu nacion post alia, ĉiam kun tiu ĉi penso en sia menso: «Mi venos al la loko, kie la Tero finiĝas kaj tie, kie la Tero kaj la ĉielo kuntuŝiĝas, mi trovos vojon al Dio kaj mi demandos lin. «Kion mi faris al Ci, por ke Ci afliktu min en tiu ĉi maniero?».

La olda virino neniam trovis la lokon, kie la Tero finiĝas, sed kvankam seniluziiginte, ŝi ne forlasis sian serĉadon. Dum ŝi pasis tra la diversaj landoj, la homoj demandis ŝin, «Vi venis por akiri kion, maljunulino?».

Kaj ŝia respondo estis, «Mi serĉas Leza».

«Vi serĉas Leza! Kial?».

«Miaj fratoj, vi demandas min! Ĉu tie ĉi en la nacioj estas iu, kiu suferas, kiel mi suferis?».

Kaj ili denove demandis, «Kiel vi suferis?».

«En tiu ĉi maniero. Mi estas sola. Kiel vi vidas min, izolitan maljunulino; tia mi estas!».

Kaj ili denove respondis, «Jes, ni vidas, Tia vi estas! Senigita je amikoj

kaj parencoj. Kiel vi diferencas de aliaj? Leza Sikakunamo sidas sur la dorso de ni ĉiuj, kaj ni ne povas forskui lin!».

Oni konsilis al ŝi turni sin al saĝuloj de diversaj nacioj por ekscii, kial ekzistas en la mondo la sufero, malbono kaj morto. La virino, do, daŭrigis sian penigan vojaĝadon kaj, renkontinte la unuan saĝulon, kies nomo estis donita al ŝi, ŝi petis lin informi ŝin pri la origino de la morto. La viro rakontis pri la tri kalabasoj.

Baldaŭ post sia kreo de la unuaj du homaj estuloj, Mu-longa kaj Mŭi-Nambuz-hi, Leza alvokis al si la mielbirdon, Maj-imba, kaj donis al li tri kalabasojn, ĉiujn fermitajn ĉe ambaŭ ekstremaĵoj. Li ordonis al Maj-imba, ke li portu tiujn ĉi al la viro kaj virino sen malfermi ilin survoje. Maj-imba estis komisita tiam diri al la homa paro, ke ili rajtas malfermi la du kalabasojn enhavantajn semojn; la trian, tamen, ili ne malfermu, ĝis Leza mem venos al la Tero por doni instrukciojn koncerntajn ĝian enhavon.

Survoje Maj-imba ne povis reteni sian scivolon kaj malfermis la kalabasojn. La unuaj du enhavis semojn de diversaj specoj, kaj kiam Maj-imba finekzamenis la enhavojn, li remetis ilin kaj fermis la kalabasojn.

Li malfermis la trian kalabason. En tiu ĉi estis la morto, malsano, ĉiuspecaj rabobestoj, kaj danĝeraj rampuloj. Tiuj ĉi malagrabraĵoj elvenis, kaj Maj-imba ne povis kapti ilin. Tiam aperis Leza kaj helpis la birdon serĉi ilin. Vere, ili trovis la leonon en ĝia kuŝejo, la serpenton en ĝia truo, kaj tiel plu, sed ili ne povis kapti ilin.

Leza diris al Maj-imba, «Vi ege pekis kaj la respondeco estas via». La terurita birdo flugis en la arbaron kaj ne loĝis plu inter homoj.

Leza tiam diris al Mu-longa kaj lia edzino, «Maj-imba estas granda pe-



kinto. Mi diris al li, ke nepre ne estu malfermita la tria kalabaso, ĝis mi venos, sed li malobeis min. Pro tio li portis al vi multe da ĉagreno, la malsanon, la morton kaj la danĝeron de leonoj, leopardoj, serpentoj kaj aliaj malbonaj bestoj kaj rampuloj. Tion mi ne povas nuligi, ĉar tiuj ĉi aĵoj eskapis kaj ne povas esti kaptitaj. Vi, do, devas konstrui kabanajn kaj ŝirmejojn, kie vi vivos protektite kontraŭ ili».

La maljuna virino, atente aŭskultinte la rakonton, dankis la rakontiston, sed ŝi ankoraŭ ne estis kontenta. «Eble estas alia klarigo de la

origino de la morto. Mi deziras aŭdi, kion diras aliaj saĝuloj». Ŝi vojaĝis plu, ĝis ŝi troviĝis ĉe alia nacio kaj petis, ke iu rakontu al ŝi pri la sama temo. Elpasis viro kun profunda scio, kiu asertis, ke lia opinio ne la mielbirdo sed la homo mem respondecas pri sia mortemo. Jen kiel okazis tiu misago.

Iam malgranda viro kun du pakoj, unu granda kaj la alia malgranda, venis al viro, kiu okaze laboris en la arbaro, kaj diris al li, ke li elektu unu el liaj pakoj.

«Tiu ĉi», li diris, prenante la grandan pakon, «Enhavas spegulojn, tranĉilojn, bidojn kaj ŝtofojn, kaj tiu ĉi, «li diris, prenante la malgrandan pakon, «enhavas la eternan vivon».

La viro mem ne kuraĝis elekti, sed iris demandi aliajn homojn en la urbeto. Dum li forestis, kelkaj virinoj venis al la loko, kaj ili estis petitaj fari la saman elekton. La virinoj provis la klingandojn de la tranĉiloj, drapiris ŝin per la ŝtofoj, admiris sin en la speguloj, kaj sen plua penso elektis la grandan pakon. La malgranda viro malaperis kun la alia pako.

Kiam la arbara laboristo revenis, li trovis nur la virinojn, kiu okupis sin per la disdivido de la enhavo de la granda sako. Sed la homoj nun perdis la eternan vivon, kaj restis la morto. Kaj en tiu ĉi maniero homoj diras: «Ho, se tiuj virinoj nur estus elektintaj la malgrandan pakon, ni ne estus mortintaj tiel ĉi!»

Ne plaĉis al la oldulino, ke virinoj estis kulpaj pri la ekzisto de la morto kaj ŝi estis instigita serĉi alian klarigon. En la sekva loko, kie ŝi haltis, la tiea saĝulo rakontis al ŝi pri fuŝulo, kiu modifis la deziron de la kreinto.

Kiam Maŭu kreis homajn estulojn, li intencis, ke ili havu la eternan vivon. Sed la araneo havis kontraŭan opinion. Maŭu prenis kalaba-

son, metis ĝin sur la akvon kaj diris, ke en la sama maniero kiel la kalabaso ĉiam restas sur la surfaco, tiel la homo restu sur la Tero.

La araneo ĵetis ŝtonon en la akvon dirante la vortojn, «Maŭu diru, ke kiam homo mortas, li malaperu kiel tiu ĉi stono kaj neniam reaperu». Maŭu konsentis pri tio ĉi.

Poste, kiam la patrino de la araneo mortis, ĝi deziris, ke Maŭu ŝanĝu tiun ĉi ordon de aferoj, sed Maŭu rifuzis. Se Maŭu estus ŝanĝinta sian ildiron, homaj estuloj estus revenintaj post la morto same kiel la Luno, kiu mortas kaj revenas.

Kiam la maljunulino aŭdis pri la Luno, ŝi demandis la saĝulon, kial la homo ne estas kiel tiu astro, kiu vere neniam mortas, sed nur kreskas kaj malkreskas. La rakontinto diris, ke la homo preskaŭ akiris tiuspecan vivon, sed pro diversaj kialoj, tio ne okazis. Li sendis ŝin al la apuda vilaĝo, kie oldulo rakontis pri la mise transdonita mesaĝo.

Onidire la Luno iam sendis in-sekton al la homoj, dirante, «Iru al la homoj kaj diru al ili: «Kiel mi mortas, kaj mortante vivas, tiel ankaŭ vi mortas, kaj mortante vivas».

La insekto ekiris kun la mesaĝo, sed dumvoje kuratingis lin la leporo, kiu demandis, «Kiun komision vi havas?» La insekto respondis, «La Luno sendis min al la homoj, por diri al ili, ke kiel ŝi mortas, kaj mortante vivas, tiel ankaŭ ili mortas, kaj mortante vivas».

La leporo diris, «Ĉar vi estas mallerta kuranto, permesu al mi iri». Dirinte tiujn ĉi vortojn, li forkuris kaj, kiam li atingis la homojn, li diris, «La Luno sendis min diri al vi: «Kiel mi mortas, kaj mortante pereas, en la sama maniero ankaŭ vi mortas kaj tute pereas».

La leporo poste reiris al la Luno kaj raportis al ŝi, kion li diris al la

homoj. La Luno kolere riproĉis lin, dirante, «Ĉu vi kuraĝas diri al la homoj ion, kion mi ne diris?».

Dirante tiujn ĉi vortojn, la Luno prenis pecon da ligno kaj batis la leporon sur la nazon. De post tiu tago la nazo de la leporo estas fendita, sed la homoj kredas, kion la leporo diris al ili.

La maljunulino ne volis akcepti, ke rezulte de stulta frazo de iu leporo, la homo ricevis la plej grandan malbonon, la morton. Ŝi insistis pri ankoraŭ unu klarigo, sed tiu saĝulo ne provis kontentigi ŝin. Fine, lia edzino proponis sian rakonton.

Lun tagon dio demandis la unuan homan paron, kiu tiam loĝis en la ĉielo, pri la speco de morto, kiun ili volis: ĉu tiu de la Luno aŭ tiu de la banano. Ĉar la paro konsternite demandis sin pri la implicoj de la du manieroj de morto, Dio klarigis al ili

jene: la banano eligas ŝosojn, kiuj anstataŭas ĝin, kaj la Luno mem reviviĝas. La paro meditis longan tempon, antaŭ ol ili faris sian elekton. Se ili elektus esti seninfanaj, ili evitus la morton, sed ili ankaŭ estus tre solaj, ili mem estus devigataj fari la tutan laboron, kaj ili ne havus iun, por kiu ili laboru kaj strebu. Pro tio ili preĝis al Dio, ke ili havu infanojn, bone konsciaj pri la sekvo de sia elekto. Kaj ilia preĝo estis plenumita. De post tiu tempo la restado de la homo sur tiu ĉi Tero estas mallonga.

«Ĉiu klarigas la ekziston de la morto laŭ sia propra inventemo», ĝemis la maljunulino. «Kiu vere scias? Nur Dio!» Sed ŝi neniam efektivigis sian deziron trovi Leza: si mortis pro rompita koro.

BERNARD GOLDEN
(Vezprem, Hungario)

FUNDACION ESPERANTO

CONCURSO

De acuerdo con las bases establecidas para la adjudicación del premio,

«CASANOVAS-FERRANDIZ»

de la Fundación ESPERANTO, el Patronato de la Fundación ha acordado adjudicar dicho Premio, a Don Angel Salete Tejero, de Zaragoza, cuya desinteresada y eficaz labor en pro de la enseñanza y difusión del Esperanto, le hacen acreedor al mismo.

Zaragoza, a 15 de diciembre de 1981.

Firmado: INES GASTON,
Secretaria del Patronato de la
Fundación ESPERANTO y del
Concurso

SUKCESAJ VIZITOJ POR LA ESPERANTO-MOVADO EN VALLADOLID



Ada Fighiera,
redaktorino de «Heroldo»

Dum la 17-a, 18-a kaj 19-a de novembro pasintjare kaj laŭ persona invito de la H.E.F.-Prezidantino, estis en Valladolid, S-ino Ada Fighiera-Sikorska, redaktorino de la prestiĝa esperantista periodaĵo «HEROLDO DE ESPERANTO».

La viziton de tiu elstara kaj mondkonata esperantistino ni profitis por informi la publikon pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Unue, en la loka gazetaro, ni anoncis la esperantlingvan prelegon kiun ŝi diris jaŭde la 19-an je la oka vespere. Poste, kiam ŝi estis inter ni, ni kaptis la okazon por kontaktiĝi kun la tri lokaj radiostacioj kaj en ĉiu ni estis kore kaj amike akceptitaj.

La 17-an de novembro, akompanate de D-rino Urueña, Prezidantino de H.E.F., ŝi estis intervjuata dum 45 minutoj ĉe Radio Valladolid kaj dum 30 minutoj ĉe Radio Popular. La sekvan tagon akompanate de S-ro López Nalda, profesoro de la Elementa Kurso de Esperanto en la Grupo «Fido Kaj Espero», estis intervjuata dum dek minutoj ĉe La Voz de Valladolid (La Voĉo de Valladolid). Frukto de tiuj intervjuoj estas ke laŭ peto de radioparolisto de Radio Valladolid, ĉiujaŭde en la kadro de la programo «La Klubo de la Vespere» estas dekminuta programero pri Esperanto kun komentario kaj Mallonga E-Kurso.

La 19-an je la 8-a vespere, en Salono de la Restadejo de Jezuitaj Pastroj S-ino Ada Fighiera-Sikorska prelegis pri «Henry Sienkiewicz, aŭtoro de Quo Vadis». Prezentis ŝin, hispane, la Prezidantino de H.E.F. D-rino M. R. Urueña.

Per tre flua Esperanto kiu kaptas la atenton de la tuta ĉeestantaro S-ino Fighiera-Sikorska prezentis al ni la vivon kaj la verkadon de la pola verkisto Henry Sienkiewicz, gajninto de la Literatura Nobel-premio pro sia verko «Quo Vadis» kaj rakontis pri la situacio de Pollando dum la vivo de Sienkiewicz, tiam dividita inter najbaraj potencoj: Prusujo, Rusujo kaj Aŭstrujo. Ŝi parolis ankaŭ pri la multaj vojaĝoj de Sienkiewicz tra la mondo kiuj kaŭzis la aperon de liaj verkoj: «Leteroj el vojaĝo» (pri siaj vojaĝoj al Ameriko kaj Afriko) kaj «Tra dezerto kaj Praarbaro» aperinta la jaron 1911-an kaj kies esperantan tradukon eldonis Heroldo de Esperanto.

Se por la okcidentanoj Sienkiewicz estas ĉefe konata kiel aŭtoro de «Quo-Vadis», kiu temas pri la unuaj kristanoj en Romo, en sia naskiĝlando li estas konsiderata kiel granda heroo pro sia «Trilogio» kiu konsistas el «Per fajro kaj glavo», «La diluvo» kaj «Sro-Wolodyowski», en kiuj li majstre desegnis la glorajn momentojn de la Pola historio de la XVII-a jarcento. Pro la famo kiun Sienkiewicz atingis ekster Pollando, li estis elektita Prezidanto de multaj komisionoj kiuj rabis al li tempon por la literatura verkado kaj tio kaŭzis ĉian elmigran en Svislandon kie li mortis la 15-an de novembro 1916-a, kiam li estis 70 jara.

Kelkajn jarojn poste liaj restaĵoj estis translokigitaj al lia amata patrujo inter la fervoro kaj la amo de liaj samlandanoj kaj estas entombigita en la Katedralo de Varsovio kiel unu el la gloraj filoj de Pollando. Fine, ŝi legis fragmenton de la verko de Sienkiewicz «La Lanternisto» en la esperanta traduko de KABE.

Tondra aplaŭdado premiis S-inon Fighiera-Sikorska pro ŝia ege interesa prelego. La Estraro de H.E.F. kiu organizis la aranĝon ricevis multajn gratulojn.

La 10-an de decembro je la oka vespere, en la salono de la Sacerdota Restadejo de Valladolid, prelegis esperante S-ro Lech Kosieniak, estrarano de Pola E-Asocio kaj komitatano de U.E.A., pri la temo «La Katolika Vivo de Pollando»; li, kiel profesia ĵurnalisto kunlaboranto en pluraj katolikaj gazetoj de Pollando, kaj ĉefredaktoro de la katolika semajnevuo I.T.K. faris gravan prelegon kiun aŭskultis kun granda intereso la ĉeestantoj, kiuj je la fino faris plurajn demandojn.

Pri tiu evento ankaŭ detale informis la loka gazetaro kaj radiostacioj, kaj notinde estas ke la hispana televido per sia korespondanto en Valladolid kaptis parton de la prelego kaj intervjuis la H.E.F.-Prezidantinon D-rino Urueña por la regiona programo «Informativo I» kiu estis dissendita la 14-an de decembro.

L. HERNANDEZ

42-a HISPANA E-KONGRESO

MALAGA, 16-21 Julio 1982-a

Kongresejo.—Gi situas en Caja de Ahorros Provincial de Málaga (Alameda de Andalucía, 54-56), en plena centro de la urbo, tre proksima de Grandaj Magazenoj kaj restoracio. Preskau ĉiuj autobusoj au cirkulas fronte al nia estonta Kongresejo, au altas apude.

Hispanalingva prelego.—Pri la temo «Linvaj rimedoj». Parolos Prof. Antonio de la Sota.

Honora Komitato.—Gis nun akceptis aparteni al la Honora Komitato la Ministroj pri Internaj Aferoj, pri Justeco, pri Transporto Turismo kaj Komunikado.

Nova Kongreskonto.—Krom tiu jam anoncita en antaŭa numero de Boletín oni malfermis alian ce Caja de Ahorros Provincial de Málaga, «42 Congreso Nacional de Esperanto», Nº 3300.050.913.8, Alameda de Andalucía, 54-56, MALAGA.

Niaj malagaj samideanoj laboras por ke la Kongreso sukcesu, kunlaboru kun ili sendante jam nun vian aligilon kaj vian kotizon.

NIAJ GRUPOJ

VALENCIA.—Kiel tradicie, ni festenis la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof per diversaj aranĝoj.

La 15-an de Decembro, en nia sidejo, ni aŭskultis prelegon de nia veterana Prezidanto S-ro Bosch pri la temo «Parolado al la lernantoj»; sekve, la ĉeestantoj ĝuis aŭskultante la «Romanco-n de Amparo» verkitan de nia Vicsekretario S-ro Pascual Pont.

La dimanĉon, 20-an de Decembro, la Grupo honorigis D-ron Zamenhof me-tante laŭrkronon sur lian memorplaton de la strato D-ro Zamenhof, kaj kantante je la fino «La Espero-n». Poste, oni vizitis la tombejojn de la forpasintaj esperantistoj. Por fini la feston, ni komune tagmanĝis en «Casa Cesareo», kie ni kutime bankedas de antaŭ kelkaj jaroj. Je la fino salutis nia Vicprezidanto S-ro José P. Sempere; S-ro Arnau, nome de la grupo de Ceste kaj S-ro Albero, nome de la Grupeto de Burjasot.

BILBAO.—La Bilbao-a Esperanto-Grupo festis la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof, laŭ la jena programo:

Mardon 15-an.—S-ro Julio Juanes prelegis pri «Vivo de Zamenhof» kaj sekve okazis vigla interparolado inter la ĉeestantoj.

Vendredon 18-an.—Pluraj membroj de nia Grupo rakontis siajn travivaĵojn dum ilia partopreno en diversaj internaciaj Esperantistaj aranĝoj.

Sabaton 19-an.—Kelkaj el la novaj lernantoj ludis teatraĵon, speciale verkita por tiu tago. Same kiel dum la antaŭa tago ni trinkis kaj manĝetis.

Dimanĉon 20-an Je la 12-a tagmeze, en nia sidejo, ni trinkis aperitivan kaj fine, ni tagmanĝis en tipa restoracio.

VALLADOLID.—La Grupo «Fido kaj Espero» festis la 122-an naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof per diversaj aranĝoj:

La 14-an, lunde, laŭ aranĝo de la loka Grupo kaj de Hispana Esperanto-Federacio, je la 7,30 vespere oni projekciis du interesajn filmojn en la internacia lingvo pri Oslo kaj Norvegujo en la Salono de la «Caja de Ahorros Popular» kiu ege plaĉis al la ĉeestantaro.

La 15-an, marde, je la oka vespere en la sidejo, D-ro Gil Contreras, Prezidinto de nia Grupo, prelegis esperante pri «La graveco de la sindonemo en la vivo». Je la fino, oni faris al la preleganto plurajn demandojn.

La 17-an, ĵaŭde, je la 6-a vespere, S-ro Angel Diez, Vicprezidanto de H. E. F. kaj F-ino Tina Tranque, estrararino de la Grupo, skize parolis pri la vivo de Zamenhof per Radio Valladolid.

Je la 8-a en la salono de nia sidejo, S-ro Jacinto Urueña, Vicsekretario de H. E. F., prelegis hispane pri «El problema lingüístico en la evolución de la civilización». La temo, tre interesa kaj altnivela, altiris la atenton de la tuta ĉeestantaro. Sekve, la ĵus finintaj gelnantoj ricevis, donacitan de la Grupo, la Esperantan emblemon.

La 20-an, dimanĉe, je la 13-a Pastro Jonás Castro celebris S-tan Meson en Esperanto, en la kapelo de la Sacerdota Restadejo.

Fine, kelkaj kuraĝuloj kunsidis por frata manĝado en «Mesón del Hidalgo» kaj gustumi tipan kastilian menuon.

URUEÑA

SEVILLA.—En la «Academia Sevillana de Esperanto» oni instruas du Elementajn Kurson de Esperanto kaj en la Instituto «Padre Coloma» de Jerez de la Frontera (Cádiz) okazas alia Elementa, kun ĉeesto i. a. de ses geprofesoroj.

MADRID.—La 5-an de decembro en «Club Amigos de la Unesco» okazis organizite de Madrida E-Liceo, festo por omaĝi D-ron Zamenhof kies 122-an naskiĝdatrevenon oni festos post kelkaj tagoj. Unue, ni vidis tre interesan filmon pri Japanio, kiun faris nia samideano José F. Arroyo dum sia vojaĝo al tiu interesa lando. Sekve, S-ro Lech Kosieniak parolis esperante pri «Vivo de D-ro Zamenhof» kaj poste oni disdonis la premiojn de la 3-a Literatura Konkurso de Madrida E-Liceo kaj finis la aranĝon per kantado de la Licea himno.



Grupo da gesamideanoj atente aŭskultas interesan prelegon

BARCELONA.—Kun granda sukceso malvolviĝas en **Barcelona E-Centro** la Elementa Kurso de Esperanto, gvidata de S-ano Miguel Gutiérrez Aduriz, kun ĉeesto de 30 gelnernantoj. En la sama centro, la 23-an de novembro estis inaŭgurita ekspozicio sub titolo: «Komerco kaj Esperanto».

Kun la celo helpi la eksterlandajn esperantistojn kiuj vizitos la urbon okaze de la Tutmonda Futbala Konkuro, oni starigis Informan Oficejon.

En **Klubo de Amikoj de la Unesko**, la 21-an de novembro S-ro Gabriel Mora i Arana, Sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj, prelegis pri la temo: «Mia Flanko poezia», kaj en la sama Klubo, du tagojn poste, parolis S-ro Giordano Moya pri la temo «Guerra o Polemologia».

La intereso pri la lernado de Esperanto konstante kreskas, kaj pruvo estas ke du novajn kursojn oni malfermis en Barcelona: Unu okazas marde kaj ĵaŭde, de la 20-a ĝis la 21-a horo en strato Avinyó 44, kaj la alia okazas ĉiu vendrede de la 19-a ĝis la 20-a en la sidejo de la «Asociación Familiar de Vecinos» D-ro Zamenhof 17 gvidate de S-ro Solé.


GIJON.—La **ZAMENHOF-TAGO** en nia urbo, ĉi-jare, okazis la 20-an de Decembro, dimanĉon, laŭ jena:

PROGRAMO

10,30 h.—«Interkona Mateno», post akcepto de la gepartoprenantoj, kiuj alvenis el diversaj partoj de nia Provinco.

11-a h.—Malfermo de la Festo, en la Teatro de la Katedro «Jovellanos», per paroladeto, kiun legis nia Prezidanto, pri Zamenhof kaj Esperanto. (La paroladeton verkis s-ano Alcibiades González, sed li mem ne povis partopreni la Feston).

Poste la Ensemblo «Jovellanos» premita en pluraj internaciaj konkursoj, prezentis diversajn kantojn kaj dancojn kun akompanaĵo de tamburo kaj sak-



ŝalmo, kujn majstre ludis du specialistoj. La prezentado estis artkvalita kaj la artistoj vestitaj per buntaj tipaj kostumoj vekis fortan aplaŭdodon far la spektantaro, ĉe ĉiu unuopa prezento.

Dum la interaktoj, 5-jara infanino, Ana Rosa, ankaŭ vestita per tipa kaj bunta asturia kostumo, parkere kaj tre simpatie deklamis kelkajn mallongajn ŝercajn monologojn.

13-a h.—La gesamideanaro promene (ĉar je eĉ la vetero favoris la Feston) translokiĝis al la strato ESPERANTO, kie du junulinoj el la citita Ensemblo «Jovellanos» survestitaj per la tipaj buntaj kostumoj, solene metis florbukedon sur la nomtabulon de la strato.

14,30 h.—En restoracio proksima al nia Asocia sidejo, okazis bankedo kun partopreno de kvardeko da gesamideanoj. La bankedo, kiel kutime ĉe tiaj okazoj, disvolviĝis en etoso de frateco kaj gajhumoro, kun kantoj, rakontado de anekdotoj, ŝercoj, ktp., ktp.

Pri nia festo informis lokaj ĵurnalo kaj semajna komerca informilo; samkiel Radio Oviedo (la 17-an je la 8,30 h.) en programo por la Nacia Informado (Cadena Nacional), kaj Radio Gijón, la saman tagon je la 15,15 h.

ADONIS

ELCHE.—La loka Grupo aktivas por la disvastigo de la Internacia Lingvo. Pasintjare, ni partopenis en la 41-a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Murcia, kaj en la Renkontiĝo de la Valenciana Regiono; ni organizis la 5-an H.E.J.S. tendaron, pri kies sukceso vi jam estas informitaj per BOLETIN; ni projekciis du interesajn filmojn pri Norvegujo en esperanto, afable senditajn de nia Federacio, kaj ekde la monato oktobro, oni istruas tri Elementajn Kursojn, unu el ili en la Instituto «Ntra. Sra. de la Asunción». Laŭlonge de la jaro, ni ricevis la viziton de kvar samideanoj (du belgoj, unu anglo, kaj unu hungaro).

Estante, ni planas inde festi la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof, kaj partopreni en la 6-a H.E.J.S. tendaro okazanta en Logroño.

A. VERDU

SABADELL.—Centro de Esperanto Sabadell, la 13-an de decembro, okazigis ampleksan programon, esence ĝi estis la jena: Matene, alportado de infandegsignaĵoj pri la paco; disdonado de ĉokolado al la partoprenantaj infanoj. Ekspozicio de ricevitaĵoj desegnaĵoj; disflugigado de kolomboj kaj tagmeze je la 14,30 horo komuna tagmanĝo.

LA ĴURNALISTA KAPRO

Jen estis lando, tute verda kaj tre bela, regata de kruelega tigro, mastro kaj sinjoro de la teritorio. Al tiu lando venis ĵurnalista kapro.

—Ho, kiel granda lando kaj kiel bone regata ĝi estas! —Diris la kapro ĝentile antaŭ la suvereno.

Sed, kom paroli, ĝi devis skribi. Do, kun la deziro bone impresi per siaj kronikoj, ĝi diris pri la tigro en unu el ili: «Ĝia vosto estas blazono de aristokrateco».

Kaj okazis, kiel okazas en ĉiuj regnoj de la mondo, ke iam la urso anstataŭis la tigron.

Longe cerbumis la kapro, ĉar kiel sciante la urso ne havas voston, kaj konsekvence ne plu konvenis laŭdi tiun korpoparton, sed male. Do, la kapro skribis jene en sia revuo: «Feliĉe la nova suvereno malhavas tiun aĉan apendicon, kiun oni nomas vosto».

Konstantinte tian kontraŭdiron, la elefanto, abonanto de la revuo, protestis al la ĵurnalista kapro. Kaj tiu respondis cinike:

—Nu, mi konstatas, ke vi komprenas nenion pri moderna ĵurnalismo. Kiam mi laŭdas same ĉiun el tiuj du bestoj, ĉu vi ne vidas klare, ke gravas ne tio, ĉu ili havas voston aŭ ne, sed tio ke ili havas krifojn kaj dentojn?».

Aŭtoro: Víctor Manuel Pérez Perozo (Venezuelo)
Traduko: Liven Dek.

PRI NIAJ PRESAĴOJ

La vigleco de la movado mezureblas diversmaniere, pere de la kongresoj, agado de niaj grupoj, eldonado de sciencaj kaj literaturaj libroj, aliaj presaĵoj, ktp.

Rilate presaĵojn (revuoj, bultenoj, informiloj), ŝajnas ke multaj esperantistoj en nia lando ne tro multe scias pri tiuj aperantaj ĉe ni, kaj tio estas facile komprenebla, ĉar nur «BOLETIN» atingas la plej multon, dum la aliaj bultenoj kaj informiloj celas nur apartajn grupojn.

Pri «BOLETIN» ni ĉiuj pli —malpli bone scias kia ĝi estas. Certe ĝi aspektas dece, ĝia enhavo estas adekvata al la disponeblaj fortoj kaj agado, kaj la lingvo estas bona kun ne tro multaj makuletoj. En la numero 246-a altiras nian atenton ĉe la kovrilo la vorto «geinfanoj», en kiu la prefikso «ge» estas tute superflua; la eraro certe devenas de tio, ke en la kastilia lingvo oni distingas «niño» disde «niña».

Ekzemploj de tre interesaj artikoloj oni povas trovi en la numero 247-a: prilaboraĵo de tradukbanko kaj sciencaĵo pri la teorio de la relativeco. Kaj, kio pri tiu anoncita pre-universitata kurso pri matematiko, fiziko kaj kemio?

Alia tutnacia bulteno, kompreneble pli modesta, estas la revueto de la junularo «HEJS-Juneco», 28-paĝa, kies lasta numero estis plene preparita de la madrida junularo. En ĝi, ni trovis interesan ĉefartikolon, diverstemajn artikoletojn, spritaĵojn, ktp. Rilate la lingvon, pri kiu ni devas esti ĉiam severaj, oni devas atentigi pri eraroj kiaj: en «La radiado» posedaĵo anstataŭ eco, en «Stranga Limo» miriĝas anstataŭ miras; en «Humoro» oni atentu pri tio, ke la kelnero povas miri aŭ surpriziĝi sed tute ne strangiĝi! Tamen, malgraŭ tiuj lingvaj makuloj, ni gratulas la redaktoron, s-ro Miguel A. Sancho, kaj ĉiujn la kuraĝajn kunlaborantojn.

Nova revueto estas «Sulko», 10-paĝa, eldonita de hispana sekcio de ILEI. En la revuo, dua numero, ni konstatis tro malmultan spacon dediĉitan al la komencantoj kaj artikoletojn ne tro lerneajn, cetere troviĝas pluraj eraroj, kiuj nepre ne devas aperi en lerneja gazeto: «Ni malscias se tiu libro...» anstataŭ «Ni ne scias, ĉu tiu libro...», «Koloru la frontan paĝon» anstataŭ «Kolorigu la frontan paĝon». Malgraŭ ĉio, la revueto estas signo pri la vivanteco de la movado ĉe ni, kaj ni do gratulas ĝian redaktoron, s-ro Juan Medrano, kaj kuraĝigas lin, ek antaŭen!

Kiam temas pri lokaj grupoj, la plej bona eldonaĵo estas sendube tiu de Centro de Esperanto Sabadell «Sabadell Esperantista», 16-paĝa revueto, kiu tre bone plenumas sian rolon. La 12-paĝa bulteno «Nia voĉo» estas frukto de la laboro de la Madrida Esperanto-Liceo, kaj en ĝi oni povas trovi eĉ tre interesajn artikolojn pri minoritataj lingvoj (Keĉua, Kataluna, ktp.).

La bulteno de la (Mondpaca Esperanto-Movado), 12-paĝa, prezentiĝas same modeste, sed dece, samkiel la bulteno «Kolektado», 8-paĝa kiu celas ĉiun esperantistan kolektemulon.

Kelkpaĝajn, aŭ pli precize kelkfoliajn, informilojn aperigas pli-malpli regule la grupoj «Fido kaj Espero» de Valladolid, Barcelona Esperanto-Centro, Grupo Esperantista de Bilbao kaj eble aliaj pri kiuj ni ne scias.

Fine, oni povas mencii «Heroldo», kiu, kvankam ne specife hispana periodaĵo, nuntempe estas eldonata ĉe ni, kaj la novan revuon «SOCIAL-HUMANISTA GAZETO», organo de la samnoma movado, kaj kies unua numero aperis antaŭ ne longe. Ĝi estas dulingva, jen esperanta kaj kataluna, jen esperanta kaj kastilia, kaj enhavo estas interesa.

Resume oni povas diri, ke ĉe ni ja malabundas nek presaĵoj nek entuziasmo, kvankam rimarkeblas la diseco de la agado.

Miguel GUTIERREZ

Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj



ESPERANTISTA KULTURDOMO DE GRÉSILLON

Funkcianta de antaŭ 30 jaroj, la Esperantista Kulturdomo de la Kastelo de Grésillon aranĝas por la nuna jaro diversajn periodojn. La unua okazos de la 4-a de aprilo ĝis la 11-a de la sama monato, kaj dum ĝi i. a. oni okazigos diskutrodojn pri lingvo-instruado.

Dum somero, estos kvar periodoj, la unua komenciĝos la 27-an de junio kaj finiĝos la 10-an de julio; la dua, komenciĝos la 11-an kaj finiĝos la 31-an de julio; la tria, de la 1-a ĝis la 14-a de aŭgusto; kaj fine, la kvara, de la 15-a ĝis la 28-a de aŭgusto.

Ĉiuj periodoj estas tre allogaj, ĉar la gepartoprenontoj povos alesti la diversajn prelegojn, studadon de la lingvo, manlaborojn kaj malkrovi la naturajn belaĵojn de la regiono. Petu informojn rekte al: Esperantista Kulturdomo. Kastelo de Grésillon. F-49.150 BAUGE (Francujo).

EKSPozICIO DE LA HUNGARA NACIA TURISMA OFICEJO

De la 19-a ĝis la 28-a de Marto okazos en la Etnografia Muzeo de Budapeŝto,

ekspozicio en kiu partoprenos hungara E-Asocio. La aranĝon vizitos proksimume 100.000 gastoj, do la stando de H.E.A. estos tre grava pro la propaganda kaj informa laboro. El la vidpunkto de nia movado, ne estas indiferece kiel ĝi aspektos. Kun la celo ke ĝi estu kiel eble plej multkolora ni petas la sendon de turismaj afiŝoj, prospektoj, k.t.p.

La unuan tagon de la ekspozicio, ni aranĝos letervesperon, kaj lotumos libro-donacojn inter tiuj kiuj sur sia bildkarto sendis iun sloganon pri la kontakto inter Esperanto kaj turismo.

Skribu al: Hungara E-Asocio, BUDAPEŝTO, Pf. 193; H-1368.

15-a PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

Okazonta en Zagreb (Jugoslavio) de la 7-a ĝis la 10-a de oktobro de 1982-a.

La festivalo kiun organizas Internacia Kultura Servo, havas apartan karakterizon, ĉar ĝi stimulas la uzon de la Internacia Lingvo Esperanto por efektiviĝi pli facilan kaj egalrajtan internacian komunikigon.

39-a KONGRESO DE I.K.U.E.

De la 17-a ĝis la 23-a de julio okazos en Lille (Francujo) la nunjara Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La temo de la Kongreso estos: «La paco». La programo antaŭvidas ekskurson al nordaj montetoj, kaj interesajn prelegojn pri la kongrestemo.


Korespondada adreso: 39-a IKUE-Kongreso, Centre des Dominicains, 7 Avenue Salomon, F-59.800 LILLE (Francujo).

ALVOKO

Kelkaj kunlaborantoj decidis starigi rondeton de amikoj de Hispana Esperanto-Muzeo, kun la celo helpi ĝin en la serĉado de Esperanto-materialo. Ĉiu, kiu kontribuos sendante esperantaĵojn al al Muzeo, aŭtomate fariĝos membro de ĉi tiu rondeto.

Bonvolu sendi la materialon al: Hispana Esperanto-Muzeo, Str. Zamenhof, 12, Sant Pau d'Ordal (Barcelona).

67-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



Okazonta en Antverpeno (Belgujo) de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1982-a. Laŭ informoj aperintaj en la revuo «Esperanto» ĝis la mezo de decembro aliĝis proksimume 500 gekongresanoj el 42 landoj.

Hispana Esperanto Federacio intencas aranĝi komunan vojaĝon al la kongresurbo kun posta vizito al la ĉefaj belgaj urboj.

S-ro Wim De Smet estro de la fako pri ĝeneralaj sciencaj servoj de la Reĝa Belga Instituto, por Natursciencoj en Bruselo, estis nomumita Rektoro de la I.K.U.

Por filatelistoj, grava novaĵo estas ke denove kaj okaze de la U.K. aperos speciala por-kongresa poŝtmarko. Ĝi aperos la 6-an de Junio, kaj ĝia valoro de 10 belgaj frankoj sufiĉos por afranki poŝtkarton sendotan eksterlanden.

Hispana Esperanto Federacio, kunlabore kun Vojaĝagentejo SAMAR de Madrid, aranĝas komunan vojaĝon por partopreni la Kongreson, de la 23-a de Julio ĝis la 11-a de Aŭgusto, vizitante post la Kongreso Bruselon kaj Parizon. La vojaĝo estos per aviadilo kaj inkluzivos la loĝadon en 3-stelaj hoteloj kaj la matenmanĝon. Interesitoj, petu pli detalajn informojn al H.E.F.

Alvoko de la Hispana Ruĝa Kruco

SOLIDARECO KUN LA POLA POPOLO

La Internacia Ruĝa Kruco, respondante al la peto de Pola Ruĝa Kruco, direktas alvokon al ĉiu Asocio el la mondo, petante helpon pro la malfacila situacio travivata de la frata popolo de Polujo.

Oni devas solvi urĝe, speciale por la plenaĝuloj kaj infanoj, necesajojn kiujn oni skizas jene:

Nutraĵojn: speciale ladmanĝaĵojn viandajn, fiŝajn, vegetaĵajn kaj simile.

Bazajn medikamentojn: kotonon kaj vandojn.

Vestaĵojn: ŝuojn, puloverojn, mantelojn kaj lankovrilojn.

La Hispana Ruĝa Kruco kunlaboras en ĉi tiu humaneca tasko kaj invitas kaj petas insiste ĉiujn, civitanojn, registarojn, klubojn kaj politikajn asociojn kunlabori kaj partopreni kun iliaj helpoj por mildigi la dolorojn kaj malfacilaĵojn de popolo kiu tuj necesas nin.

La helpo per mono kaj varoj devos esti transdonitaj al ĉiuj kunvenejoj de la Ruĝa Kruco, kaj en la kontoj malfermitaj por ĉiu tiu okazo en la bankoj.

FACILAJ TEKSTOJ POR LA KLASO

- kie —Bonan nokton, Loli.
- tie —Bonan nokton, Naivulo, mia kara edzo. Ĉu vi laboris multe, hodiaŭ,
- tie-ĉi en via Banko? Vi estas laca? La vespermanĝo estas jam preta por la
- nenie sinjoro de la kastelo.
- ie —Nu! Kion mi vidas! Ĉu vi ŝanĝis la ĉambron?
- ĉie —Jes, Karulo. Nia hejmo ŝajnas nova, ĉu ne?
- apud —Hummmm. Kie estas la tablo?
- inter —Tie, kontraŭ la muro, inter la du fenestroj.
- sur —Kion vi metis sur ĝin?
- sub —Florojn. Freŝajn florojn. Kaj vidu. Sub la tablo estas kuseno por la
- en kato.
- super —Ja. Tiu nigra besto estas la vera mastro de la hejmo. Kaj... miaj libroj?
- antaŭ Ĉu vi trovis ie lokon por ili?
- post —Sendube. Ili estas en la ŝranko. La novaj dekstre, la malnovaj
- ĉe dekstre. La luksaj supre kaj la plej uzitaj malsupre. Ĉu bone?
- kontraŭ —Bonege. Sed... nenie mi vidas cindrujon. Kial?
- ĝis —Ĉar ek de nun vi ne plu fumos ĉi tie, amato mia.
- al —Ĉu ne? Kie mi fumos, do, amatino?
- el —Ĝis nun vi fumadis tra la tuta domo. En ĉi cambro, en la kuirejo, en la
- por banĉambro, en la dormoĉambro, en la koridoro kaj eĉ en la balkono. Ek
- per de nun, vi fumos nur en via laborĉambro.
- laŭ —Sed, karulino, ĝis nun mi havis cindrujojn ĉie.
- kun —Certe, Naivulo. Kaj ĉie estis cindro kaj ĉiam odoris malagrabla.
- fronte al —Do, mi povos fumi nenie?
- pri —Kial ne? Iru al via meditĉambro kaj tie vi povos fumi.
- de —Kaj ĉi tie ne?
- dekstre —Tute ne! Laŭ la nova regularo, vi devos fumi en via pensoĉambro.
- supre —En tiu lup-rifuĝejo? Tie mi havas nur malnovan tablon.
- malsupre Antaŭ la tablo staras lama benko kaj post la tablo antikva brakseĝo.
- voli —Kaj super via kapo la terura lampo, kiun via sankta patrino donacis al
- devi ni.
- povi —Ja. Kaj fronte al mi, la portreto kun la teruraj lipharoj de via digna
- kial? patro, kiam li estis serĝento. En Waterloo, mi supozas.
- ĉar —Karulo, neniam mi diris al vi, kion mi pensas pri la via. Iam ni parolos
- kiu pri tio.
- tiu —Ĉu oni povas scii, kiu konsilis al vi fari tiun ŝanĝon? Iu stultulino,
- iu neniu sendube.
- neniu —Eble. Estis via fratino Mari.
- ĉiu —Tiu strigo! Neniu povas fidi pri la familio. Kiam ŝi estis ĉi tie?
- kiam —Ĉi matene. Kaj ŝi helpis min movi la meblojn.
- tiam —Bone. Mi deziras fumi. Ĉu mi povas aŭ ne?
- iam —Ne ĉi tie. Iru al via lupejo.
- neniam
- ĉiam
- for
- kio
- tio
- kia
- ĝis nun
- ek de nun

—Loli... Ĉu vi konas la edzajn rajtojn? Se iu edzo ne estas permesata fumi hejme, tiam li rajtas iri al la kafejo kaj ludi kartojn kun la plej fifamaj fraŭlaj amikaĉoj.

—Naivulo... Ĉu vi konas la edzinajn rajtojn?

—La... kion?

—La edzinajn rajtojn! Se iu edzo fuĝas nokte el la hejmo kun iu ajn vana preteksto, tiam la forlasita edzino rajtas rigli la pordon de la dormoĉambro.

—Sed kion vi diras, mia edzineto tre amata! Ĉu vi kapablas? Ĉu vi lasus min dormi sur la sofo? Ĉu vi povus pasigi tutan longan, malvarman nokton en soleco, for de mi? Ne, neniam vi kapablos tion fari.

—Ĉu ne? Provu.

—Ho, karulino. Reveni hejmen je la kvara matene kaj trovi vian pordon riglita! Kia terura malfeliĉo! Kaj ĝuste ĉi nokte, kiam mi alportis belegan donacon por mia edzineto tre amata. Vidu...

—Hoooo! Kia mirinda horloĝo! Bone... ĉiu regularo havas esceptojn.

—Ĉu vere? Do, mi povos fumi ĉi tie?

—Kaj kie ajn vi volos, mia respektata edzo.

—Loli, karulino...!

—Naivuleto, amato mia...! Kiseton.

—Muá.

—Muá.

J E S

MONDA FUTBALKONKURSO M-82

1982 estas la jaro de la Monda Futbalkonkurso M-82, ĉi-foje okazonta en Hispanio.

La tagon 13-an de junio je la sesa horo vespere, 5.000 kolomboj kaj 10.000 balonoj flugos super «Camp Nou» stadiono de F. C. Barcelona. Sur la gazono grupo de 2.000 personoj dezegnos per siaj korpoj la pacan kolombon de Picasso. Tiamaniere oni komencos kaj inaŭguros Mondan Futbalkonkurson M-82.

La granda nombro da partoprenantaj teamoj kaj la atendata lavango da sekvantoj, turistoj el la plej diversaj landoj, kiuj alvenos spekti la matĉojn, certe buntigos kaj babeligos la tutan spektaklon de la konkurso.

Prezentiĝas tiel do, tre bonan okazon por paroli pri Esperanto, pro tio la hispanaj esperantistoj ekkoncis jam pri la graveco de la evento kaj oni ĵus komencis labori rilate la temon.

Rezulte de la unuaj preparlaboroj, Madrida

Esperanto-Liceo, Atocha 98 - 4^o, t-no 230 87 98, Madrido-12, organizos Internacian Simpozion pri la «Sporto en la moderna socio», de la 7-a ĝis la 11-a de julio, sub la aŭspicioj de Universala Esperanto —Asocio kaj Hispana Esperanto-Federacio; kaj Barcelona Esperanto-Centro iniciatis porokazan fakon.

INFORMOFICEJO M-82 kun la celoj: helpi la turistojn kiuj vizitos nin kaj enkonduki nian internacian lingvon Esperanto ĉe la koncernajn instituciojn, kiuj partoprenos en la diversaj aranĝoj de la organizado de la matĉojn, ekz. Ruĝa Kruco, F. C. Barcelono, Generalitat, Barcelona Magistrato, RENFE, k. a.

INFORMOFICEJO M-82 ejas ĉe Carreras Candi 34 t-no 240 26 62, Barcelona-28, kaj ĝia laborhoraro estas la jena: de la 9-a ĝis la 13-a kaj de la 17-a ĝis la 20-a horo.

Jam ekde nun ĉiaspecaj kontaktoj estas bonvenaj ĉe la du menciitaj adresoj.

NOTAS DE INTERES PARA TODOS LOS FEDERADOS

— Se recuerda que la Cuota de Socio Abonado para el presente año es de 750 pesetas. Se ruega a todas aquellas personas que hayan enviado a la Tesorería de la Federación Española de Esperanto una cantidad inferior a la citada, tengan la bondad de enviar la diferencia por giro postal a la dirección de la Tesorera.

— Habiendo cumplido su período como Vocales de la Federación D. Víctor Ortiz Gratal, de Zaragoza y D. Pedro Nuez Pérez, de Barcelona, se ruega a todos los socios federados residentes en las zonas de Cataluña, Aragón, Rioja y Navarra, que deseen presentar su candidatura para Vocal de la Federación, remitan a la Secretaría de la Federación nota detallada de su actividad en pro del Esperanto.

— Ante las numerosas consultas recibidas en relación con las diversas revistas que se editan en Esperanto, se ruega a todas aquellas personas que llevan la representación de alguna, envíen nota a la Secretaría de la Federación, indicando nombre de la revista, periodicidad, precio del abono y cuantos detalles consideren convenientes.

— Con el fin de facilitar el trabajo tanto a la Tesorería de la Federación como a la Tesorería del Comité Organizador del 42 Congreso Nacional de Esperanto, se ruega a los Grupos Esperantistas que procuren en lo posible recoger las cuotas correspondientes para enviarlas colectivamente.

ESTADO DE CUENTAS DE LIBRO-SERVO DE H. E. F. EN 1981

Existencias al 1 de enero de 1981		147.590 pts.
Ventas realizadas en 1981	351.161	
Valor precio de compra	245.573	
Beneficio bruto	105.588	
Gastos generales (papel, sellos, etc.)	20.056	
Beneficio neto	85.532	
Entregado a Tesorería de H. E. F.	15.000	
Beneficio final	70.532	70.532 pts.
Existencias el 31 de diciembre de 1981		218.122 pts.
Existencia en material	182.145	
En Caja de Ahorros Popular	19.331	
En Caja Postal	14.568	
En metálico	2.078	
TOTAL		218.122 pts.

Valladolid, 31 de diciembre de 1981

Vº Bº
M. R. URUEÑA
(Presidenta de la F.E.E.)

Jacinto URUEÑA
(Vicesecretario de HEF y
Encargado de Libro-Servo)

KARLO

Unuakta teatraĵeto verkita de Meg Blacker

La Patro kaj la Patrino sidas en la salono. La Patro legas la ĵurnalon kaj la Patrino trikas. La Patro estas sen ŝuoj kaj havas truojn en siaj ŝtrumpoj. Estas frapo ĉe la pordo. La Patrino iras al la pordo kaj revenas kun telegramo.

- Patrino: Iu estas morta! Mi scias, ke iu estas morta!
Patro: Donu ĝin al mi, malsaĝa virino. (Ŝi donas la telegramon al la Patro, kiu malfermas ĝin). Ĝi estas de Johanina.
- Patrino: Johanina estas morta, mi scias tion!
Patro: Ne estu malsaĝa. Johanina ne povus sendi telegramon se ŝi estus morta. Ne, ŝi alvenos hejmen je la dua horo. Estas preskaŭ la dua horo nun. La telegramo legiĝas: «Ni alvenos je la dua horo Johanina kaj Karlo».
- Patrino: Kiu estas Karlo? Mia filineto havas amaton! Ŝi edziniĝos! Mia kara filineto, mi ne kontraŭstaros tion! Mi devas havi belan novan robon por la geedziĝo.
Patro: Estos sufiĉe por mi havi novajn ŝtrumpojn sen truoj!
Patrino: Ĉu ni okazigos la geedziĝon en la katedralo aŭ la urbdomo? Nenio estas tro bona por mia filino.
Patro: Ni okazigos ĝin en la «Rozo kaj Krono» —oni havas bonan bieron tie, kaj ĉiuj miaj amikoj povos ĉeesti.
- Patrino: Viaj amikoj! Se ili ĉeestos, mia patrino ne ĉeestos. Vi scias, ke ŝi estas prezidantino de la Bando de Espero, kaj ŝi ne ŝatas bieron.
Patro: Ho, mi memoras, ke ŝi ne estis tute sopra ĉe geedziĝo de via fratino!
Patrino: Tio estis pro ĉampano. Ĉampano estas sinjorineca trinkaĵo. Ne la sama, kiel tiu vulgara biero!
Patro: Se miaj amikoj ne povos ĉeesti kaj trinki bieron, vi ne havos vian patrinon kaj vian novan robon.
Patrino: (plorante) Vi estas kruela viro. Mi iros hejmen al mia patrino. Neniu amas min!
Patro: Nu, nu, mia kara; ne ploru. (Li prenas poŝtukon el sia poŝo kaj viŝas ŝiajn okulojn). Vi havos katedralon, vian urbdomon, vian ĉampanon, kaj vian patrinon por bona mezuro!
La pordo malfermiĝas kaj Johanina envenas. Ŝi kisas siajn panjon kaj paĉjon.
- Johanina: Saluton, panjo kaj paĉjo. Plaĉas al mi esti ĉe mia hejmo.
Patrino: Kie estas Karlo?
Johanina: Karlo? Mi lasis lin en la enirejo.
Patrino: Do, iru kaj konduku lin en la ĉambron. Mi volas renkonti lin.
Johanina: Panjo, ne ekscitiĝu. Karlo estas tute sekura en la enirejo.
Patro: Eble vi ne komprenas, ke ni multe volas vidi lin. Efektive ni havas la rajton renkonti lin. La junulino estas senpripensaj.
- Johanina: Mi ne komprenas, kial vi tiel multe deziras tion, sed mi iros kaj envenigos Karlon. (Ŝi eliros la ĉambron).
Patro: (Al sia edzino). Estas evidente, ke oni devas esti firma pri la junulinoj. Tiel ili respektas nin.
- Johanina: (Re-envenas Johanina kun granda artefarita ludila urso). Jen estas Karlo. Mi gajnis lin en lotado!

KLARIGA NOTO

S-ino A. Fighiera precizigas ke la festivalo (pri kio oni skribas raportante pri ŝia parolado en la 5-a paĝo de la numero 248) estis de demokrata junularo (Monda festivalo) ne dum la milito, sed en 1955 en Varsovio. Kaj ke la dungo por tradukistino ne estis en si mem grava, se montris, kiel la lingva problemo estas grava.

«KVEBRAĤO» AŬ «KEBRAĈO?»

Bernard Golden

En la hispana-Esperanto vortaro de E. Tudela Flores (**Vocabulario Español - Esperanto**, Valencia, 1966) estas registrita la vortformo «kvebraĥo» kiel esperantigo de **quebracho**, la nomo de kelkaj specoj de arboj el Argentino kaj Ĉilio kun tre malmola ligno. La etimologio de la hispana vorto atestas la durecon de la ligno. **Quebracho** estas kunmetaĵo de la verbo **quebra**, «rompas», kaj la substantivo **hacha**, «hakililo», kiuj fariĝis unue **quebracha** kaj poste **quebracho**.

Sciante tiun etimologion, oni estas surprizita pro la kripligita formo de la vorto en la menciita Esperanta vortaro. Jam antaŭ pli ol duonjarcento la eminenta esperantologo Eugen Wüster en sia **Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana** skribis «kebraĉo», kiu precize redonas la prononcon de la origina etimo. Mankas la orelagaĉa silabo «kve», kaj la lasta konsonanto estas «ĉ» kaj ne «ĥ». De kie venis la «ĥ» en «kvebraĥo»?

En aliaj etnolingvoj la hispana vorto aŭ ne estas asimilita (germana **Quebracho**) aŭ ĝia ortografio estas modifita (hungara **kvebracsó**, en kiu **cs** = «ĉ»). Nur en la bulgara lingvo troviĝas **kvebraĥo**, kiu evidente estas transskribo farita sen scio pri la ĝusta prononco de **ch** en la hispana lingvo. Sed kial hispaneparolanta vortaristo faris tiun saman lingvan misaĵon?

«Kvebraĥo» ne estas izolita ekzem-

plo de la misuzo de «ĥ» en Esperanto. Kelkfoje kompilantoj de vortaroj aŭ verkantoj estas influitaj de la prononco de vorto en sia gepatra lingvo, kiu havas la saman devenon kiel la Esperanta vorto, do ili preteratentas ties ĝustan literadon. Jen tri ekzemploj.

1. **Menĥiro** (en **Esperanto-Bulgara Vortaro**).—La bulgara vorto estas skribata **menĥir**, ĉar la sono «ĥ» ne ekzistas en tiu lingvo. La ĝusta formo en Esperanto estas «menhiro».
2. **Ĥuligano** (en novelo verkita de ĉeĥa aŭtoro).—En la ĉeĥa lingvo la samsignifa **chuligan** havas la komencan digramon **ch**, kiu estas prononcata kiel «ĥ». Plej verŝajne la ĉeĥa lingvo ricevis tiun vorton de la rusa **ĥuligan** kaj ne rekte de la angla **hooligan**, ĉar la «ĥ»-sono ja ekzistas en la ĉeĥa. La vorto en Esperanto estas «huligano», en kiu la «ĥ» estas fonetike ekvalente al la **h** en la angla etimo.
3. **Maĥjavelismo** (el artikolo en **La Kancerkliniko**).—La itala propra nomo Machiavelli estas esperantigita «Makiavelo» en **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV), kaj tiu prononco de la itala digramo **ch** kiel «k» estas ĝenerala ankaŭ en etnolingvoj havantaj vortojn derivitajn de la nomo, ekzemple **maquiavelico** en la hispana. La altrudo de la sono «ĥ» estas tute

ne pravigebla kaj, fakte, enigma, ĉar en la gepatra lingvo de la aŭtoro de la artikolo, la franca, la nomformo **Machiavel** ne havas tiun sonon. La fonemo «h» ne ekzistas en la franca lingvo.

Kvankam la uzo de «ĥ» en la ĉi-supre cititaj vortoj estas sen ombro de dubo erara, kion diri pri alia tendenco manifestiĝanta ĉefe en Esperantaj tekstoj verkitaj aŭ redaktitaj de Josef Kavka, la redaktoro de **Scienca Revuo**? Li fervore, preŝkaŭ fanatike, insistas pri la uzo de «ĥ» en vortoj kiel «ĥemio», «ŝĥemo» kaj «arĥeologo». Kvankam tiuj vortoj, devenas de helenaj etimoj, en kiuj troviĝas la litero ĥi (χ), jam de longe en Esperanto, same kiel en pluraj etnolingvoj, la helena prononco modifiĝis, kaj la «ĥ» transformiĝis en «k». Komparu la hispanajn ekvivalentojn de la tri ekzemplaj vortoj: **química**, **esquema**, **arqueólogo**. D-ro Kavka ne estas kontenta revivigi nur tiajn eksmodiĝintajn vortformojn. Li ankoraŭ skribas «ĥino» laŭ la zamenhofa maniero, malgraŭ ke la popolo mem nomas sin «ĉinoj», kaj li elterigis la polvokovritan radikon «ĥarakter-», kiun Zamenhof uzis nur unu fojon kaj poste ŝanĝis al «karakter-».

Esperantologoj, inkluzive de d-ro Zamenhof mem, dum la tuta historio de Esperanto rimarkis, ke la fonemo «ĥ» estas tre malofte uzata en la lingvo. Ĝi utilas nur por diferencigi kelkajn homonimojn kiel «koro/ĥoro» kaj «kolero/ĥolero», kaj por precize indiki la prononcon de malmultenombraj propraj nomoj kaj etnomimoj kiel la hispanaj «Himena», **Jimena**, kaj «ĥoto», **jota**. Lastatempe d-ro Kavka komencis distribui broŝuron titolitan **La fonemon Ĥ kaj ties transformoj en la internacia**

scienca leksikologio, sed krom kelkaj apogantoj en lia propra lando, estas dube, ke liaj argumentoj konvinkos multajn aliajn esperantologojn kaj sciencistojn. La tendenco dum la naŭjardeka evoluo de Esperanto estis en la direkto al ĉiam malpli ofta uzo de «ĥ». Tiuj, kiuj scias la historion de aliaj lingvoj, komprenos, kial kontraŭstaro al tiaj naturaj ŝanĝiĝoj estas sensenca kaj vana. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ estas skeptikaj, legu la sekvan citaĵojn el verkoj de d-ro Zamenhof pri «h», litero «tre malofte renkontata kaj baldaŭ espreble tute malaperonta...»

«...anstataŭ la nemultaj vortoj kun «ĥ» mi donis sinonimajn vortojn kun «k» kaj tiamaniere mi sen rompadado forigis la uzadon de tiu ĉi sono, kiu por tre multaj personoj estas tro malfacile elparolebla...»

«La sono «ĥ» estas tute eljettata. Tiu ĉi sono estas rezervata en la alfabeto nur por fonetika skribado de nomoj kaj havas la formon «kh». En ĉiuj vortoj, kiuj ĝis nun havas la sono [tiele!] «ĥ», ĝi estas anstataŭigata per la sono «k». Nur anstataŭ la vortoj «ĥolero» kaj «ĥoro» devas esti «holero» kaj «koruso».

«En ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas eviti la sonon «ĥ» kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon «k». La ĝis nun jam ekzistantaj vortoj kun «ĥ» estas permesate uzi ankaŭ kun «k». Paralele kun la vortoj «ĥoro» kaj «ĥolero» (en kiuj oni ne povas anstataŭigi «h» per «k»), oni povas uzi «ĉoro» (choro) kaj «ĉolero» (cholero).»

Tiel Zamenhof argumentis kaj klarigis la problemon de «ĥ», kiam li proponis reformojn en Esperanto.

SANTANDER

JOSE LUIS HIDALGO, *Cantabria*
(1919-1947)

Santander en la nokto
borde de l' akvo mara,
akvo kiu ĉe l' kajoj
kraĉas verda kaj mava.
(Santander en la nokto, miamemore;
borde de l' maro, de mia nostalgio)

Brumaj formoj kaj ombroj
de barĝoj kaj ŝirm-toloj.
La grupoj kreskas tiel
ke similas fantomojn,
fantomojn stingantajn lanternojn la
[dormemajn
ĉe l' prujno ripozantajn

(Du maristoj ebriaj
inter akraj blasfemoj,
tra la stratoj lontanaj
iras al la mateno).

Santander en la nokto
borde de l' akvo mara,
akvo kiu ĉe l' kajoj
kraĉas verda kaj mava.
(Santander en la nokto, en la
[memoro;
en la marbordo, en mia nostalgio).

Trad.: LIVEN DEK

ESTAS MI ESPERANTISTO

JULIO BAGHY

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto
estas mi esperantisto
Kuŝas ie sub tegmento
«Netuŝebla Fundamento»
Tuŝu ĝin nur la Mefisto
estas mi esperantisto
Polkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro
Tedas min la vortolisto
estas mi esperantisto
Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
librojn legu la verkisto
estas mi esperantisto
Mi parolas kun rapido:
«Bona tagon! Ĝis revido!
ĝi suficas por ekzisto
estas mi esperantisto

Pionirojn mi kritikis
la gvidanton dorne pikas
kaj konspiras kun persisto
estas mi esperantisto
Por la venko mi esperas
sed nenion mi oferas
Mi ne estas ja bankisto
estas mi esperantisto
Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto
estas mi esperantisto
Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento
ĝi sufiĉas por sofisto
estas mi esperantisto
Post la mort'ĉe tomo mia
staros «rondo familia»
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

SCIU KE...

Nova librovendejo estis organizita sub la nomo «LLIBRERIA SERRANO» gvidata de nia samideano Luis Serrano, en ĝi ĉiuj esperantistoj trovos interesan stokon da E-libroj. Adreso, strato Font Nova 32, Sabadell.

INTEGRAL, ekologista, naturista kaj kultura revuo, regule publikigas informojn pri nia movado kaj E-lernolibroj. Plie en la n-ro 29 publikigis dupaĝan artikolon pri Esperanto, kaj liston pri ĉiuj esperantaj asocioj de Hispanio.

PETETE, ĵus eldonita revuo, pri edukado kaj instruado en kastilia lingvo por la infanoj enhavas vortaron kun 10 lingvoj, inkluzive en Esperanto.

SULKO, revueto por la infanoj estas jam eldonita de I.L.E.I. Colegio Nacional. Callosa de Segura. Alicante. Sendu rekte al la indikita adreso infanajn kunlaboraĵojn en Esperanto kaj kompreneble abonigu!

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO. Pasintjare en la 14-a P.I.F. en Zagreb (Jugoslavio) la ensemblo, Vilanova i la Geltrú (Barcelono), «L'Estaquirot» ricevis la 7-an premion de la Internacia Faka Jurio kaj s-ro Joan Inglada ricevis la 1-an premion «Jozefo Petrin» por pupisto kiu plej bone parolas Esperanto-n ekster la scenejo.

S-ro Narcís Serra urbestro de Barcelona, pro peto de agema esperantisto Jesús Pérez pagis persone la buĝeton por eldoni informilon en Esperanto pri la «Deklaro pri la Rajtoj de la Handikapuloj» en la organizajo «Patronat Municipal de Disminuïts Físics», Portal de l'Angel, 8-10, Barcelona-2.

Komerca entrepreno eldonis foliojn 7 lingve inkluzive en Esperanto, indikante la neceson de internacia lingvo kaj la elekton de Esperanto pro ĝia taŭga agado por la Paco kaj la frateco de la homaro. «Peletería José María Javier», Diputación, 174, Barcelono-11.

CURSET D'ESPERANTO. Nova kataluna lernolibro pri Esperanto estis eldonita en Manresa. Ĝi uzas esence la metodon «ĈE», formato 17 × 22 centimetroj, 86 paĝoj. Prezo 500 pesetoj. Mendu ĝin, Pere Saumell i Vila, Bruc 53-2-3, Manresa aŭ en Llibreria Esperanto kaj Libroservo de HEF.

SOCIAL-HUMANISTA GAZETO. Redaktejo, Cervantes, 29. Terrassa, jarabono 600 pesetoj, eldonita en: Kataluna-Esperanto, Kastilia-Esperanto, Portugala-Esperanto, Franca-Esperanto kaj Germana-Esperanto.

RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

«Les Chimères» (La Ĥimeroj).—Gerard de Nerval
Prezentas kaj tradukas Gaston Waringhien.
Eldono Gabrieli, Ascoli Piceno, Italio, 1976.
20 x 14 cmtj. 77 pĝj. Preso kaj bindo tre bonaj.

La nomo de Gerard de Nerval (1808-1855), vernome Gerard Labrunie, rangas tre alte en la franca literaturo de la romantika epoko. Li formiĝis sub la influo de Victor Hugo, kaj multon ŝuldas al la siatempaj germanaj romantikistoj. Esence poeteca spirito, liaj prozaj verkoj estas forte impregnitaj de poezio. Per liaj «Ĥimeroj», sonetaro pri grekaj temoj, malfermiĝis antaŭ li la pordoj de la granda franca poezio. Oni necesas koni la vivon de la poeto, liajn amorojn, vojaĝojn kaj legadojn, por plene kapti la etoson kaj valoron de tiuj versoj. Kaj jen ni havas la laboron de Gaston Waringhien por ĉion povi kompreni. Li prezentas la francan tekston de la «Ĥimeroj» kaj aliajn elstarajn versojn de Nerval, kune kun traduko en esperanto. En «Antaŭparolo», Waringhien situas la verkiston en lia epoko kaj disvolvas lian biografion kaj verkaron, nin preparante por ĝui tiujn belegajn sonetojn. Je la fino de la libro, «Notoj» abundaj, koncizaj kaj klarigaj helpas nin por sekure eniri en tiun boskon de referencoj, aludoj kaj imagoj, kiuj plenplenas la verkojn de la romantika poeto.

Kion diri pri la traduko de Waringhien? Unue, mia senlima admiro kaj respekto al la esperantista laboro de W. en ĉiuj aspektoj. Kaj poste, post legado, paĝo kontraŭ paĝo, de la franca kaj esperanta tekstoj, denove mia admiro, ankaŭ senlima, pro la majstra maniero, en kiu Waringhien scias trovi la ĝustajn vortojn, esprimojn, turnojn, ritmon kaj rimon, por transdoni al ni la penson kaj formon de la originalo.

Kelkfoje, oni divenas la penson de la laboro, kiam la imperativoj de la traduko pelas la tradukiston uzi formojn kies sono ne redonas la muzikon de la originalo. Sed estas ja konate, ke eĉ plej bona traduko, malfacile atingas la tutan kvalitaron de la grandaj verkoj. Post tiu neevitebla konsidero, mi finu dirante, ke tiu ĉi volumo estas vera plezuro por esperantistoj kapablaj ĝui la plej altan poezion. Ĝi estas libro aŭtonoma, encirkla, ĉar ĝi enhavas ĉiujn necesajn elementojn por bone situi kaj studi verkiston kaj verkaron en tempo kaj spaco, laŭ la solida, tradicia metodo de la franca skolo.

JES

NOVAĴO

Jam estas mendebla ĉe Libroservo de H. E. F. glumarkojn pri la Universala Kongreso okazonta en Antverpeno. Aĉetu ĝin kaj uzu en via korespondajo. Prezo: 25 p-toj po dek ekzempleroj.



Josep Ventura i Freixas

Ni treege bedaŭras la forpason de **Josep Ventura i Freixas**. Li mortis la dek kvaran de novembro en Terrassa, lia naskiĝurbo, okdek okjara. Li estis elstara postvivanto de tiu epoko, inter la du mondmilitoj, kiam Esperanto plej floris en Katalunio, tiel same en populara disvastiĝo kiel en elstaraj verkistoj. La esperantista ora epoko en Katalunio.

Samideano Josep Ventura jam en 1908 verkis esperantan poeziaĵon kaj daŭris en la poezio kun poemoj, kiuj meritis premiojn en esperantaj literaturaj konkursoj. Dum pluraj jaroj li estis la sekretario de la Katalunaj Floraj Ludoj kaj el juĝantaro de literaturaj konkursoj, post nia milito, en tiuj de H.E.F.

Por la «Kataluna Antologio», atesto pri la florado de Esperanto en Katalunio, li tradukis la verkojn de Joan Maragall «Laŭdo al la Parolo» kaj «Gekantistoj el Terrassa» kaj de Víctor Catalá (Caterina Albert) «La Anstataŭigo», rakonton pri rustikaj kampuloj.

De tiu verkistino li entreprenis la tradukon de la romano «Solitud» (Soleco), pentraĵo pri la sufero de la vivo de alta spirito kunvivanta kun la banala ĉirkaŭanta medio, ŝia propra

edzo, kaj ĉio meze de alta montaro en poezia etoso de la naturo kaj la puraj animoj de maljuna paŝtisto kaj simpla knabeto.

La tradukado de tiu elstara verko estis tre malfacila pro la kompleksa stilo de la teksto, kiu esprimas ĉiujn plej profundajn nuancojn de la sento kaj la penso. Epopea romano en kiu baraktas la amo kaj la banalaĵoj, la simfonio de la alta montaro kaj la soleco meze inter la homoj.

Josep Ventura fidele tradukis la stilon kaj la enhavon de la originalo. Lia agado tiel same disvastigas la gravecon de la kataluna literaturo kiel honoras Esperanton.

Kial Josep Ventura elektis traduki tiun verkon? Sendube pro tio, ke li profunde raviĝis pro la poezia etoso de tiu proza kataluna esltara verko: «Soleco».

Josep Ventura laboris por Esperanto laŭ la devizo: «Mi volas kuraĝe batali ĝis la morto». Adiaŭ, samideano Josep Ventura!

G. MOYA

Gonzalo García Alvaro

Ankaŭ ni ricevis informojn pri la forpaso de nia entuziasma kaj aktiva samideano **Gonzalo García Alvaro**, kiu multe laboris en la E-movado kaj lasttempe multe helpis la funkcion de la Centra Oficejo de H.E.F. en Madrido. Ripozu pace.

Laŭ informoj ricevitaj, la 2-an de aŭgusto 1981-a forpasis nia samideano **Manuel Ruiz Maza**. Pace ripozu.

Al la familianoj de niaj forpasintaj samideanoj, ni esprimas nian sinceran kondolencan.

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro HUYN Van Thoai, 118, lo V, Chung cu Ngo Gia Tu; Phuong 03, Quan 10; **Ho Chi Minh Urbo** (Vjetnamio), 22 jaraĝa, instruisto pri angla lingvo kun geĥispanoj.

F-ino Vegvari Judit, **Nagykanizka**, Hunyadi Ter 1; 8.800 Hungario, 18 jaraĝa studentino kun hispanaj geĥjunuloj inter 18 kaj 20 jaroj.

S-ro Veliko Knezevic, **23.000 ZRENJANN**; Rade Koncara 26; Jugoslavio 29 jaraĝa kun geĥispanoj por interŝanĝo de uzitaj p. m.

Kun geĥispanoj, S-ro Kiss Jozsef; **JASZBERENY**; Lepke u 1 (Hungario).

S-ro Rufino López; Apartado 314; **LA HABANA** (Cuba), por interŝanĝo de b. k. kaj p. m.

S-ro Casimiro Trujillo; Barranco Seco, I. C. P. **LAS PALMAS DE GRAN CANARIA** kun la tuta mondo por li kaj por aliaj kvin samideanoj.

Bulgara esperantisto-filatelisto por interŝanĝo de p. m. S-ro Georgi Sestrimski; ul. Silistra, 4; **4.400 PAZARDJIK** (Bulgario).

SOCIOS PROTECTORES EN 1981 (continuación)

24. Julio Herrero Segura	Nº 2.563
25. Virtudes Molina Gómez	Nº 2.564
26. Ana María Hernández Ros Codorniú	Nº 2.490
27. Antonio Costa	Nº 395
28. Juan Martínez Mauri	Nº 1.433

DONATIVOS 1981

Suma anterior	39.747 pesetas
Antonio Gamboa y Sánchez	12.000 pesetas
Angel García Brañanova	500 pesetas
Clementina Tranque Iglesias	2.000 pesetas
Juan Martínez Mauri	200 pesetas
TOTAL	54.447 pesetas

DONATIVOS 1982

Pedro Alcedo	150 pts.
A. Figuera	1.100 pts.
Antonio Gamboa	250 pts.
Suma y sigue	1.500 pts.

NUEVO DUMVIVA MEMBRO»

María García, Vda. de Alvarez, nº 1.795.

SOCIOS PROTECTORES 1982

1. Francisca Yruegas	Nº 719
2. Rafaela Uruña	Nº 1.904
3. Jonás Castro	Nº 2.450
4. Grupo de Valencia	Nº 1.187
5. Gregorio Benítez	Nº 2.567
6. Florentino Fuentes	Nº 2.062
7. José Palmero	Nº 1.712

6-a H. E. J. S. TENDARO

(Logroño 8-an ĝis la 11-an de Aprilo 1982-a)

PROGRAMO

- 8-an Ĵaŭde : Disdonado de informoj, kaj dokumentoj
Esperanto-kursoj: elementa kaj supera
- 9-an Vendredo : Kunveno de la delegitoj de la E-grupoj kaj
H.E.J.S.—Estraro. 7-a H.E.J.S.—Tendaro.
Redakcia kunsido de H.E.J.S.—Juneco.
Esperanto-kurso.
Ekskurso.
Projekcio de filmoj kaj malfermo de libro-
servo.
- 10-an Sabato : H.E.J.S.—estrara kunveno kaj Ĝenerala
Kunveno.
Prelego pri T.E.J.O., KONCIZE kaj KON-
TAKTO.
- 11-an Dimanĉo : Matena ekskurso.
Kastililingva prelego. Tablotenisa konkurso,
Festo.

RIMARKOJ

La loĝado okazos ĉe junulara restadejo kun manĝoj (kosto, 600 p-toj maksimume po tago.

Informpetojn kaj aliĝilojn oni devas peti al: HEJS-Vic-
prezidantino Ana Maria Ranero, Duque de Nájera, 20-8 A.
Logroño.